# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - **66000 PERPIGNAN** (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : **9** F. C. C. P. 956-28 Montpellier

1-a Kvaronjaro 1978 N° 66

**22-23 Avril 1978** **SÈTE**

## CONGRÈS RÉGIONAL LANGUEDOC ROUSSILLON

Post du laborkunvenoj en la "Centre Familial du Lazaret" kiu plaĉis al ĉiuj, ni decidis okazigi tie nian federacian kongreson, la 22-an de aprilo 1978. Tiu feriejo konsistas el pluraj domoj en granda parko kun ludejo por la infanoj ( do gepatroj povas veni kun la infanoj), laŭlonge de la maro ( la sportemuloj povos sin bani) .

Inter la laborkunsidoj ni povos trankvile promeni kaj spiri la bonan aeron Tie ni laboros, amuziĝos kaj tranoktos.

Kiel ni decidis en Nîmes, la kongreso daŭros unu tagon kaj duono. Tiel okazos kulturaj kaj amuzaj partoj. Komprenèble kiuj ne povos ĉeesti la tuton, tiuj venos kal foriros kiam ili deziras.

Jen la <u>programo</u> :

| | | |
|---|---|---|
| - Sabaton la 22-an de aprilo | 15 h | laborkunveno |
| | 17 h 30 | filmoj pri Bulgario kaj Islando |
| | 19 h | vespermanĝo |
| | 20 h 30 | Balo |
| - Dimanĉon la 23-an | 9 h | laborkunsido |
| | 12 h | tagmanĝo |
| | 14 h | kultura programo : teatraĵo, deklamoj |

( tiuj kiuj deziras proponi ion , sin turni al ESPERANTO - MONTPELLIER )

<u>ALIĜILO</u> : Resendu la plej eble rapide al Centre Culturel Esperanto, 5 Rue Dr Roux , 34000 Montpellier - Tel : 54. 15. 43

- NOMO : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

- ADRESO : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Sabata vespermanĝo : 25 F (1) ......
Dimanĉa tagmanĝo : 25 F (1) ......
Matenmanĝo + dormĉambro : 1 lita-ĉambro : 20 F (1) ....
2 litaĉambro : 10 F (popersone) (1)
(oni povas mendi 3 litaĉambron por familio)

(1) Bonvolu indiki por kiam da personoj vi antaŭmendas ).

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

<u>ADRESO de la FERIEJO</u> : Centre Familial du Lazaret
Rue de Bretagne - La corniche - S E T E
Estas rektaj urbaj aŭtobusoj de la Stacidomo ĝis la Corniche .

RAPORTO pri nia PORESPERANTA AGADO (S-ro CELIQUA - 48000 M E N D E...
S-ro HENIN - 48500 LA CANOURGUE )

I.- EKSPOZICIO kaj Sekvoj

Ĝi okazis en Junio kaj daŭris unu semajnon en la Centra Biblioteko de pruntoj de MENDE. Laŭ la konsiloj de la bibliotekestro ni skribis al la Eduka Inspektoro ( Inspecteur d'Académie) por informi lin pri la ekspozicio kaj peti ke li permesu al la geinstruistoj viziti la ekspozicion kun siaj klasoj. Li respondis favore kaj eĉ sendis cirkuleron al la lernejestroj en Mende. S-ro CELIQUA tuj telefonis al la lernejestroj por substreki la pedagogian valoron de la ekspozicio. Pro la ekzamenoj nur tri klasoj vizitis la ekspozicion; tiaj klopodoj apud oficialaj instancoj estas eble imitindaj. La lernejestro permesis tiun prelegon proponitan al S-ro CELIQUA de instruisto kaj tri aliaj instruistoj ankaŭ invitis S-ron C. La plimulto de la gelernantoj (11-15 jaraj) interesiĝis pri la Universala Lingvo. Dudeko vizitis individue la ekspozicion. Krome la "Centra Biblioteko" estas ĉefe uzata de geinstruistoj kaj kelkaj dekoj da ili vizitis la eksp.

Ni utiligis la afiŝojn de UFE kaj la materialon de S-ro LENTAIGNE, aperigis artikolojn en la gazetoj ("Midi-Libre" , "Lozère Nouvelle") kaj gluis kelkajn afiŝojn.

La gelernantoj demandis pri la ebleco starigi kurson en la kadro de la soci-edukaj kluboj. La estro de la "Lycée Chaptal" permesis kurson po 1 horo ĉiusemajne (merkrede) kaj la "Ĉefa Eduka Konsilantaro",konsultinte la asembleon de FSE (Foyer Socio-Educatif) aĉetis dudekon da libroj : "Sub la Verda Standardo" . 15 gelernantoj sekvas la kurson sed multaj kiuj interesiĝis en Junio ne venis ( kelkfoje ili loĝas ekstere de Mende kaj publikaj transportoj ne ekzistas).

2.- PRELEGO

En Novembro ni aperigis en la gazetoj artikolojn pri diskut-vespero ( projekcio de lumbildoj pri la lingvo-problemo). Malmultaj personoj venis (pro la vetero,pro la televida programo,ktp).Tamen, ni decidis komenci kurson por plenkreskuloj kaj gelernantoj 16 -18 jaraj. Pli ol dekvin personoj venis al la unua leciono komence de Decembro. Ni decidos komence de Januaro ĉu ni daŭrigos kun du grupoj kaj du niveloj ĉiusemajne laŭ alterno aŭ kun unu grupo ĉiun dusemajnon.

3.- KONKLUDO kaj SUGESTOJ

La klopodoj apud la oficialaj instancoj estis utilaj. Kial ne starigi naciskalan inform-kampanjon ? Ekzemple en ĉiu departemento de nia regiono, la Esperantistoj kontaktu la Edukajn instancojn (Inspecteurs d'Académie, Recteurs) por paroli al la gelernantoj pri la lingva problemo (en la kadro de la 10 %).

En Junio,pro la ekzamenoj la periodo ne estas tute favora, tamen la instruistoj facile akceptas tiam dediĉi 1 horon al eksterprograma afero.

Pri la plenkreskuloj : ŝajnas ke artikoloj en dimanĉaj gazetoj aŭ ĵurnaloj estas pli legataj ol dum la semajno. Estas ankaŭ utile aldoni al la artikoloj adresojn de Esperantistoj tra la departemento por faciligi kontaktoj kun eblaj interesuloj. La informo de buŝo al orelo estas grava sed ne sufiĉas.Laŭ la komentoj de la vizitantoj de la ekspozicio aŭ de la ĉeestantoj de la kunveno, Esperanto estas miskonata,nekonata aŭ malkonata (la elsendojn de FR.3 oni ne kaptas tie-ĉi !). UFE devas ofte kaj regule informi la gazetaron pri nia ekzistado,substrekante la praktikan utilon de Esperanto. La Feracioj devas fari same en la regionaj ĵurnaloj (kiom da artikoloj aperis ekzemple en "Midi-Libre" en la jaro 1977 ?). Ankaŭ ĉiu Esperantisto devas reklami en sia medio (socia,profesia...). Se kelkaj personoj daŭrigas la lernadon de Esperanto en Lozère, ni esperas krei oficialan grupon post kelkaj monatoj kaj tiam Lozère ne plu estos dezerto koncerne Esperanton. Ni semu kaj INFORMU !!!


- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

P.S. En Februaro,en La Canourgue, Mikiko MIMORI (Japanino) vizitis la klasojn de nia kolegio kaj la tiean Esp. Klubon (± 15 anoj),ni organizis publikan vesperon. Foto aperis en gazeto .

# KRUCVORTOJ

## Horizontale ✻

1- Lavistino (R)
2- Ricevi kiel rezultaton de sia agado – Nedifinita pronomo
3- Pintarko – Nomo de virino (R)
4- Tia estas dono en minuto de bezono (R)
Ĉefa aktorino en filmo (R)
5- Participa finaĵo – Vojo (R) Ekzisti (R)
6- Flava akvolilio – Kio restas por malfrua gasto (R)
7- Trikita vestaĵo (R) – Nedifinita pronomo
8- Nedifinita pronomo
Fabelabesto (R) – Interjekcio
9- Boteleto – Enmeti en likvaĵo (R)
10- Movi al si – Sporto (R) – Endaero
11- Japana monunuo – Unu el la respublikoj de Sovetunio (R)
12- Malpeza velŝipo – Fosila ligno.




## Vertikale ✻

1- Vendejo de uzitaj objektoj (R)
2- Fadeno per kiu oni ligas sangan vaskulon
Verso finiĝanta per neakcentita silabo
3- Havigi al si ion (R) – Interjekcio – Longa monaĥa vesto (R)
4- Freŝdata (R) Regiono de la orienta Germanio (R)
5- Morbida timo de fermita loko
6- Participa finaĵo – Infana duradeta ludilo
7- Rilata al Brita fikcia monunuo – Malagrabla insekto (R)
8- Grando, laŭ vertikala direkto – Gliti sur neĝo.
9- Pozicio sidejo (R) Tertremo (R) En ragno
10- Virina vestaĵaro – Sufikso
11- Franc-Belga rivero (R) Demeti ovaron ĉe fiŝoj
12- Nekapabla facile komprenI.


✻ – (R) nur radiko
✻ – La solvo aperos en la venonta numero

V
Solvo
de la krucvortoj
aperintaj en la N 65


| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| F | O | R | F | I | K | U | L | O | J |
| O | L | E | ■ | ■ | O | ■ | ■ | T | O |
| R | E | G | I | S | T | R | I | ■ | D |
| M | A | N | Ĝ | I | L | A | R | O | ■ |
| O | ■ | O | ■ | N | E | P | ■ | D | ■ |
| ■ | E | ■ | O | F | T | ■ | T | ■ | P |
| ■ | T | A | B | L | O | T | U | K | O |
| M | ■ | P | L | A | N | A | M | A | T |
| A | L | ■ | ■ | T | ■ | ■ | O | T | O |
| S | U | P | T | E | L | E | R | O | J |

G. Kina


# 5 minutoj de paùzo




*De post la kronectago, mi ne scias kial, mi eksuferis kapdoloron.*




*Se vi deziras rapide bonfarti, trinku tiun medikamento ne plu forĵetu fenestren !*




*Laù mia mapo, tio devus esti Insulo de la Pingvinoj.*



*Mi ne komprenas, kie estas la leterskatolo.*



*Nun mi ekscias, kial ili amuziĝis konstrui neĝviron !*



*Profesoro, vi estas petata de malsupra sinjoro.*

U N I O N  F R A N C A I S E  P O U R  l' E S P E R A N T O

4 , Bis,Rue de la Cerisaie
75004 P A R I S

Paris, la 25-an de Januaro 1978

Al S-ro R. LLECH - WALTER

72, Av. du Général De Gaulle
66000 PERPIGNAN

Estimata Sinjoro kaj Amiko ,

Post lego de via letero de la 18-a de januaro, mi konsultis mian mapon de la federacioj de UFE kaj .....konstatis, ke jam en ĝi la departemento Lozère enestas la Langvedokan Rusiljonan Federacion!

Verŝajne,pro manko ĝis nun de aktivulo en tiu departemento,neniu loka aù regiona agado povis esti farita tie, kaj Lozère restis ekster la teritorio de ĉiuj federacioj ! Do, vi povas tute oficiale konsideri ĝin kiel apartenantan al via federacio .

Al miaj koraj salutoj, mi aldonas miajn bondezirojn okaze de la nova jaro,por vi mem, kaj por la samideanoj de Langvedoko-Rusiljono .

Hervé GONIN

## K O T I Z - T A B E L O de U . F . E . por 1977 - 1978

- Lernanto de lerneja kurso 6 F
- Amiko de Esperanto 20 F
- Simpla membro 20 F
- Membro-abonanto
  - de 25 jaroj 55 F
  + de 25 jaroj 80 F
- Membro-subtenanto 120 F

## K O T I Z - T A B E L O de U . E . A . por 1978

- M.J.K. kun jarlibro k. kontakto ĝis 25 jaroj 44 F
- M.A.K. kun jarlibro,Esperanto kaj Kontakto ĝis 25 jaroj 110 F
- M.A. kun jarlibro,Esperanto ( pli ol 25 jaroj) 110 F

Kiu forgesis pagi la kotizojn devas sendi ilin al

S-ino N E G R O N
Federacia Kasistino
22,Chemin du Mas Blanc
34400 L U N E L (Téléph. 71.05.79)



# JUDA HISTORIO

Jakobo kaj Isaako,du fratofilaj kuzoj,mizere vivaĉis en pollanda geto ĉirkaŭ la jaro 1860-a.

Tiu mizero decidigis ilin elmigri al okcidenta Eŭropo. Jakobo haltis en Germanio, kie troviĝis kelkaj liaj konatuloj, kaj Isaako estis allogita far Francio. Ili do korŝire disiĝis ĉe la germania-francia landlimo. Antaŭ la disiĝo Isaako petis de Jakobo ke li pruntedonu al li kelkajn orajn monerojn, kiujn tiu-ĉi heredis de sia patro kaj de tiam zorge gardis en ĉebrusta monujo. Kvankam Jakobo ĝin ne plezure faris,li tute ne povis ĝin rifuzi kaj li pruntedonis al sia kuzo la duonon de siaj oraj moneroj,post kiam Isaako plej sin-
/ eble cere ĵuris al li kun Torao enmane ke li kiel/ plej rapide redonos tiun prunton.

Pasis jaroj ...Dum 1870-a jaro, okazis milito inter Germanio kaj Francio. Ĉi lasta estis venkita kaj devis pagi al Germanio altegan monsumon.Ĝi krome devis liveri al ĝi du el siaj provincoj : Elzaco kaj Lotaringio.

Niaj du kuzoj dume ne simile prosperis.Se Jakobo,malgraŭ la venko de Germanio baraktis en malfavoraj vivkondiĉoj, Isaako,kiu negocis postmilitajn ĉiuspecajn restaĵojn rapide riĉiĝis. Sed ju pli li riĉiĝis,des pli li avariĝis...

Unu matenon alvenis al li letero de lia kuzo Jakobo priskribanta lian malbonan financan situacion,rememoriganta al Isaako la malnovan prunton, kiun ĉi lasta neniam redonis,kaj petanta lin ke li bonvolu kiel eble plej rapide nuligi tiun lian ŝuldon,ne forgesante la kutimajn kaj laŭregulajn interezojn.

Isaako plurfoje turnis la leteron en siaj manoj pripensante kion li povos al ĝi respondi.

Finfine,li trovis solvon al tiu doloriga problemo. Li prenis plumingon kaj skribis al sia kuzo.

Mia Kara Jakobo ,

" Mi tre bonvole redonos al vi viajn pruntedonitajn orajn monerojn .
" Sed vi unue redonu al NI Elzacon kaj Lotaringion !

Ĉiame Via ,
ISAAKO

GOSO

---

## VIZITO de EKSTERLANDA ESPERANTISTINO

Kiel ofte, la grupo de Montpellier invitas eksterlandan-in-on. Ĉi-jare estas F-ino Lucija Borĉiĉ .Ŝi estas proksimume 50 jara,tre sperta kursgvidantino k. pri lingvo-problemoj,kapabla prelegantino .

Ŝi ŝatus alveni ĉirkaŭ la 15-an de aprilo.

Por ke la grupo de Montpellier planu kaj kunordigu ŝian restadon,estas necese scii :

- ĉu via grupo pretas akcepti nian eksterlandan samideaninon ?
- kiom da tagoj (minimume kaj maksimume) ĉiu grupo deziras ŝin ?
- ĉu estas preferita-j aŭ rifuzita-j tago-j ?

Kiel kutime la restado estos senpaga por la eksterlandanino.

Urĝa respondo necesas,ĉu jese,ĉu nee,kaj la gastigontoj estas petataj sin turni al

D-ino Yvette VIERNE 5,Rue Dr Roux 34000 MONTPELLIER

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**

Dépot Légal : 1e Trimestre 1978

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes

SÈTE

CONGRÈS RÉGIONAL

LANGUEDOC ROUSSILLON

**22-23 Avril 1978**

*Langue* ESPERANTO *Universelle*